

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 207 (2019:2)
Apr - Jun 2019

la homo
kaj
la rido



Omaĝo:
Alberto Flores

Unuafoje oni fotis
nigran truon

El nia historio:
Alberto Flores

Vem aí...

SIMPÓSIO PERNAMBUCANO DE ESPERANTO

LA ARTO LABORI KUNE:
ESPERANTO KAJ PARTNERAJ MOVADOJ

16 de novembro de 2019 • Recife/PE



Associação Pernambucana de Esperanto

Rua Siqueira Campos, 279, sl. 905, Edf Brasília, Recife
peakontakto@gmail.com | esperanto-pe.org
WhatsApp: (81) 99714-7753

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio
Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 207 (2019:2)
Mon - Mon 2019
78-a jarkolekto

Redaktas kaj aranĝas: Allan Argolo

Revizias: Marcionilo Vasconcelos

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Anderson Delgado, Emerson Santos, José
Mauro Progiante, Nia Espero E-Grupo,
VR E-Klubo kaj Wendel Pontes.

Kovrilo:

Foto el pixabay

La redaktanto ne respondecas pri la
subskribitaj artikoloj kaj la opinioj
ĉi-tie esprimitaj ne nepre spegulas
la opinion de AERJ



Associação Esperantista do
Rio de Janeiro

disvastigo.aerj@gmail.com



www.aerj.org.br



facebook.com/aerj.esperanto



youtube.com/user/TVaerj



Estraro

Prezidanto: Márcio Santos Nascimento

Vic-prezidanto: Allan Argolo

Financa Direktoro: Aristides Pereira

Sekretario: vakas

Direktoro pri Disvastigado: Matheus Arantes

Direktoro pri Instruado: Vitor Mendes

Fiska Konsilantaro

Rosana Caraméz, Sédio Langone,
Terezinha dos Santos kaj Gastão Casper

Enhavo

El la Redakcio _____	4
Kovrilo: La Homo kaj la Rido (José Mauro Progiante) _____	5
Kelkaj Vortserĉoj en Esperanto (Emerson Santos) _____	10
Literaturo: Esperanta Kosmogonio (Izrael Lejzerowicz) _____	11
Simpla Omaĝo al S-ro Alberto Flores _____	12
El nia Historio: O Esperanto e a S.I.E. (Alberto Flores) _____	14
Pri Esperanto-Kluboj kaj Ni (Alberto Flores) _____	15
Scienco: Unuafoje oni fotis nigran truon (Wendel Pontes) _____	17
Opinio: La devo sin eduki (Anderson Delgado) _____	19
Raporto: Profita evento por kursgvidantoj _____	20
BEL-Konferencoj 2019 sukcese okazis _____	21
30a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo _____	22

Kara leganto,

Jen por via regalo nova numero de *Rio Esperantista*!

Se vi estas sentema persono, probable vi almenaŭ ridetis vidinte la pufan kovrilon de tiu ĉi eldono. Kial kaj kiam oni ridas? Ĝuste pri tiu temo traktas José Mauro Progiante en la ĉefartikolo. Per aliro kiu konsideras eĉ psikologion kaj filozofion, li esploras la trajtojn ĉirkaŭ la homa rido kaj ankaŭ la trajtojn de spritajoj kaj iliaj klasifikoj. Oportune ni ankaŭ prezentas kelkajn vortŝercojn en Esperanto, plukitaj el la prelego de Emerson Santos kadre de la 54-a BKE kaj 39-a BEJK en Gojanjo.

Ĉu vi konas la Esperantan kosmogonion? Kosmogonio oni nomas teorion aŭ sistemon kiu klarigas la originon de la universo. Ni do profitas la ŝerceman etoson de tiu ĉi eldono por konigi al neofitoj la *satiran* verkon de Izrael Lejzerowicz *El la "Verda Biblio"*, kiu prezentas la esperantan Genezon.

En la sekvo ni registras nian sinceran omaĝon al la grandanima esperantisto

Alberto Flores, kiu forpasis la 1-an de Majo 2019 je la aĝo 96. Unue la samideanoj el la Sudparaiba Valo konigas skizon pri la agadoj de tiu ĉiam vigla kaj inspiriga samideano, aldone de konciza tempo-linio. Poste, ni inaŭguras la rubrikon *El nia historio*, kie ni reaperigos gravajn artikolojn jam publikigitaj en *RE*. Memore al S-ro Flores, ĉi-eldone legeblas lia unua kontribuajo, originale en la portugala el 1947 (jaro I de *RE*), kaj la lasta artikolo, publikigita em 1998.

Ĉi-jare scienco festenis pro grandega atingo: unuafaje oni fotis nigran truon! Pri tiu faro verkis Wendel Pontes kaj Loiĉ Rossi, el ISAE.

En la rubriko *Opinio*, la junulo Anderson Delgado parolas pri la graveco de edukado. Fine oni raportas pri lastaj esperanto-eventoj. Bonan Legadon!

Allan Argolo



EVENTA
SERVO

DISKONIGU
ESPERANTAJN
EVENTOJN
TUTMONDE

EVENTASERVO.ORG

La Homo kaj la Rido

José Mauro Progiante ¹

Iam du ĉasistoj marŝis en arbaro, kiam subite unu el li teren falis, kun la okuloj renversitaj. Ŝajne li ne plu spiradis. Tiam la alia ĉasisto, per sia poŝtelefono, alvokis la urĝan servon kaj diris: “Mia amiko mortis! Kion mi devas fari?” Kun malrapida voĉo, la asistanto instruis lin: “Trankviliĝu. Antaŭ ĉio vi devas esti certa, ke li mortis”. Fariĝis silento kaj post kelkaj minutoj aŭdiĝis pafo. Prenante denove la poŝtelefonon, la ĉasisto diris: “Nu, bone, li certe mortis. Kaj nun, kion fari?”

Laŭ perinterreta enketo farita de la Universitato de Hertfordshire, en Britio, en la jaro 2004, tiu estas unu el la du plej bonaj spritaĵoj en la mondo. Tamen, aŭdinte ĝin nuntempe, multaj homoj ne ridas kaj dubas pri la seriozeco de tiu enketo, asertante, ke ili mem konas plurajn anekdotojn multe pli ridigajn.

Estas fakto, ke reago antaŭ ŝercoj ege varias en la tempo, en la spaco kaj laŭ diversaj aliaj faktoroj. Ekzemple, la britoj preferas vortludojn, dum la francoj kaj la germanoj preferas sensencaĵojn kaj la usonanoj preferas anekdotojn pri lokaj temoj. Viroj ŝatas spritaĵojn pri sekso kaj antaŭjuĝoj, sed virinoj ne. Antikva manuskripto montras, ke antaŭ pli ol du mil jaroj la grekoj ŝatis ĉi tiun (naivan) spritaĵon: “Doktoro, ĉiutage, post kiam mi vekiĝas, mi sentas kapdoloron dum unu horo, antaŭ ol bonfarti. La kuracisto rekomendis: Do vekiĝu

unu horon pli malfrue.”

La rido estas esenca fenomeno en la homa vivo. Multaj eseoj jam estas verkitaj pri ĝi, sed malgraŭ tio ke multaj demandoj ankoraŭ atendas definitivan respondon en la kampoj de la scienco, de la filozofio kaj de la religio: Kio estas la rido? Kial ni ridas? Ĉu nur la homo ridas? Ĉu estas rilato inter rido kaj sano? Ĉu Jesuo ridis?

En la XIII-a jarcento, Tomaso la Akvinano skribis, ke la rido estas necesa por restarigi la “fortojn de la spirito”. Laŭ li, la humuro estas tiel grava por la ripozo de la animo, kiel la dormo estas grava por ripozo de la korpo. Tamen multaj religiuloj kondamnis la humuraĵojn. La Romkatolika Eklezio eĉ malpermesis la legadon de libroj pri la rido, ŝajne bazitaj sur studoj de Aristotelo, kies verko pri tiu temo perdiĝis.

Tri teorioj pri la humuro disvolviĝis:

Teorio de la supereco: La rido devenas de la sento de supereco de iu super alia aŭ super ia situacio. La supereco montriĝas per la malplivalorigo de aliulo aŭ per la mokado pri etikaj, moralaj aŭ sociaj normoj.

Teorio de la senkohereco: La rido okazas, kiam la cerbo akompanas logikan penslinion, kiu subite deflankiĝas al neatendata ideo. La rido devenas de io, kio estas ekster la normaleco de la naturo aŭ de la socio.


Teorio de la malŝarĝo: Laŭ Freud, aŭtoro de unu el la plej seriozaj akademiaj studoj pri la rido (“La spritaĵo kaj ĝia rilato kun la nekonscio”), la humuro estas maniero trompi la internan cenzuron.

Kvankam la rido estas la celo de la humuro, 80% de niaj ridoj devenas de aliaj kaŭzoj. Esence ni ridas dum sociaj rilatoj, por elmontri ĝojon, saton, sed precipe por eviti malpacon kaj agresemon. La rido senarmigas la homojn, kreas pontojn inter ili.

Tiu grava elemento de la homa konduto disvolviĝis dum la evoluado kiel komunikilo. Estas interese, ke ni jam naskiĝas kun la emo ridi, ni ne lernas tion de niaj gepatroj, per imitado. Eblas reteni la ridon, sed ne volonte ridi sen motivo. La rido estas mesaĝo, kiun ni sendas al la aliaj, subkomprenigante, ke ni estas pretaj amikiĝi, ludi, kunvivi en paco.

Se ligita al la humuro, la rido estas nur homa, kiel antaŭ longe rimarkis Aristotelo, per la fama esprimo: “La homo estas la nura besto, kiu ridas”. Ankaŭ Bergson diris, ke ne ekzistas komikeco ekster la homa sfero. Laŭ li, pejzaĝo povas esti bela, rava, malbela, sed ĝi neniam estos ridiga. Ni ridas de iu besto, kiam ni vidas ĝin en homa pozo. Ni ridas de iu ĉapelo, ne pro ĝia naturo, sed pro tio, ke ĝi havas komikan formon, kiun homo donis al ĝi.

Gravas priatenti ankaŭ la rilaton inter rido kaj la sano. Dum la ridado, la cerbo produktas endorfinon, hormono kiu kaŭzas senton de



bonfarto, mildigas la doloron, plibonigas la sangopremon, malgrandigas la streson, plialtigas la nivelon de oksigeno en la sango kaj stimulas la imunan sistemon. Kiam ni ridas, ni movas 12 vizaĝajn muskolojn; kiam ni ridegas, 24; kaj kiam ni ridas kaj ridegas samtempe, 84 muskolojn. Tio malfruigas la aperon de faltoj.

Ekzistas diversaj kategorioj de humuraĵoj: spritaĵo, karikature, ironio, komedio, satiro, groteskaĵo, farso, mimiko, k. a. Ĉi tie ni elektas la unuan por ioma disvolviĝo.

Ordinare konciza, la spritaĵo estas speco de parola miniartaĵo, kies humura efiko dependas ne nur de ĝia propra kvalito, sed ankaŭ de la talento de ĝia rakontanto. Pro tio skribaj spritaĵoj estas malpli allogaj. Por ekzisti spritaĵo, almenaŭ tri estaĵoj, realaj aŭ ne, devas kunesti: rakontanto, aŭdanto kaj priparolato (“viktimo”). Tiu triulo, pri kiu temas la spritaĵo, estas, aŭ fariĝas, fremda al la du unuaj, kaj pro tio ili senrimorse ridas. Kiam ni aŭdas laŭdiran spritaĵon, se ni konsideras, ke ni estas de la sama grupo de la priparolato, se ni simpatias aŭ kompatas lin, tiam, anstataŭ ridi, ni ofendiĝas.

Eblas klasifiki diversmaniere la spritaĵojn, ekzemple laŭ temoj, formoj, ecoj kaj roluloj.

Laŭ temoj, ekzistas spritaĵoj pri

profesioj, pri politiko, etnoj, pri minoritatoj, pri ebriuloj, pri bopatrinoj, pri frenezuloj, pri genroj, ktp.

Inter la profesiuloj plej celataj de spritaĵkreatoj estas la advokatoj kaj la kuracistoj, certe pro ilia latentaj damaĝkapablo.

Politiko ĉiam estis fekunda grundo por spritaĵoj. Jam en la Mezepoko, reĝaj amuzistoj pike ŝercis pri la moroj de la korteganoj. Politikaj spritaĵoj povas temi pri aktualaĵoj aŭ pri kliŝoj de la politiko.

Spritaĵoj pri etnoj kaj minoritatoj ordinare estas riproĉataj, sed ekzistas amaso da ili. En Brazilo, ekzemple, estas kutimaj spritaĵoj pri portugaloj, certe pro la longa koloniado, kaj pri argentinanoj, niaj najbaraj rivaloj. En Finnlando, oni faras spritaĵojn pri rusoj kaj ciganoj; en Usono, pri kanadanoj kaj meksikanoj; en Britio, pri irlandanoj; en Francio, pri belgoj. Kelkfoje la spritaĵoj ne estas pri alinacianoj, sed pri homoj de aliaj regionoj en sama lando (en Brazilo oftas anekdotoj pri bahianoj, gaŭĉoj, rianoj, k.a.).

Pli tiklaj estas spritaĵoj pri minoritatoj, kiel negroj kaj samseksemuloj, ĉar tiuj grupoj suferis multe tra la historio. En Argentino, spritaĵoj pri negroj estas tolerataj; en Brazilo, kontraŭe, ili povas esti konsiderataj krimoj. Judoj kaj skotoj ordinare ne sentas sin

ofenditaj de spritaĵoj pri ilia monavido, ĉar ili mem konfesas, ke ŝparemo estas signifa trajto de ilia kulturo. En la fono de spritaĵoj pri etnioj kaj minoritatoj estas sento pri supereco de popolo aŭ homgrupo super alia, kaj pro tio ili situas en nebula limo inter senpeka humursento kaj evitinda antaŭjuĝo.

Pli naivaj kaj tolerataj estas spritaĵoj pri ebruloj, bopatrinoj kaj frenezuloj.

Genraj spritaĵoj estas ĉefe pri virinoj, inter ili preferinde la blondaj, sed ekzistas ankaŭ venĝaj priviraj spritaĵoj.

Laŭ siaj formoj, la spritaĵoj povas esti rakontoj, demandoj kaj respondoj aŭ vortludoj.

Spritaĵoj en formo de rakonto estas la plej oftaj kaj ekzistas en ĉiaj longecoj. Ĉar ilia komikeco estas esence en la situacioj, ne en la vortoj, ili fariĝas pli aŭ malpli bonaj, depende de la talento de la rakontanto.

Demand-respondaj spritaĵoj komenciĝas per mallonga kaj ŝajne simpla demando, kiu povas havi pli-ol-unu respondojn. La ŝerca respondo estas surpriziga, ne komunsenca.

Vortludoj estas la plej malfortaj spritaĵoj, kiujn inteligentaj sprituloj uzas modere. Kiel kombino de vortoj similtajn kaj malsamsignifaj, vortludo havas sencon nur por tiuj,

kiuj komprenas ĝian fontolingvon.

Ebla ordigo de la spritaĵoj, laŭ siaj ecoj, kompreneble nekompleta, estas ilia divido en senpekaj, maldecaj, nigratumuraj kaj subtilaj.

Senpekaj spritaĵoj estas tiuj, kiujn oni povas rakonti sen risko ŝoki iun aŭ ofendi ies pudoron, taŭgaj se la celo estas ridigi ĉeestantaron heterogenan pri deveno, aĝo, religio, raso, seksa inklino, ktp. Pro tio ili konvenas, ekzemple, en familiaj kunvenoj, en profesiaj medioj, en paroladoj, aŭ por amuzi infanojn.

Maldecaj estas la spritaĵoj, kiuj enhavas fivortojn aŭ implicitajn malpudoraĵojn.

Nigratumuraj spritaĵoj estas tiuj, kiuj temas pri seriozaj aferoj aŭ pri realaj malfeliĉaĵoj.

Pli malfacilaj por krei kaj rakonti estas la subtilaj spritaĵoj, kies ridiga efiko multe dependas de la intelekto de la aŭdanto, ĉar ilia konkludo ne estas eksplicita. Se la aŭdanto ne estas sufiĉe atenta, klera kaj inteligenta por kapti la kaŝitan komikecon, li ne ridas.

Fine oni povas klasifiki la spritaĵojn laŭ iliaj roluloj. Se la protagonisto ne estas iu ĝenerala politiko, ebrulo, virino, bopatrino, alinaciano, ktp, eble li estas unu el la tradiciaj roluloj.

En Brazilo oftas spritaĵoj pri knabo nomata Joãozinho; en Usono, Little Johnny; en Hispanio, Jaimito; en

Meksiko, Pepito; en Rusio, Vovochka; en Ĉeĥio, Pepíček; en Italio, Perino; en Francio, Toto; en Esperanto povas esti Joĉjo. Seu Lunga (S-ro Lunga) estas folkloro persono de brazila nordoriento, fama pro lia netoleremo antaŭ stultaj demandoj.

Multfoje tradiciaj spritaĵoj enhavas esprimojn, kiuj populariĝas kaj komencas esti uzataj ekster iliaj

originalaj kunteksto. Ekzemploj: amiko de la jaguaro (portugallingve: amigo da onça) kaj supreniri la tegmenton (portugallingve: subir no telhado).

Fine, estas interese rimarki, ke kelkaj spritaĵoj taŭgas por amuzi nur esperantistojn, kaj tio uzblas kiel argumento favora al ekzisto de pure esperanta kulturo. Jen du ezeplaj:

Iu patro pagis al sia filino monatanrestadon en Grezijono, por ke ŝi perfektigu siajn lingvajn konojn. Post sia reveno ŝi deklaras gaje: “Paĉjo, mi ne plu estas virgan.” Li reagas: “Fi! Hontu. Mi elspezis tiom da mono, kaj vi ankoraŭ ne kapablas korekte uzi la akuzativon.”

Rekomendo farita al ĉeestantoj, en solena fermo de Universala Kongreso: “Kaj ne forgesu: la tagoj por Esperanto kaj la noktoj por ido!”



¹ Loĝanta en Bauru/SP, esperanta instruisto kaj verkisto, 58-jara, profesie fiskinspektoro, fakdelegito de UEA pri juro kaj porinfana literaturo.



Mokema priesperanta bildstrio de la serio *Gogo la testudo*, kreita de Martin Weichert

Kelkaj vortŝercoj en Esperanto

*Kial ĝirafo neniam estas sola?
Ĉar ĝi havas kolegon.*

*lun tagon, du bazaroj flugis tra la ĉielo. Homo
en la tero kriis "Bazaroj ne kapablas flugi!". Tuje,
unu el la bazaroj falis, sed la alia ne. Ĉu vi scias kial?
Ĉar ĝi estis Super-Bazaro!*

*Kial tiuj, kiuj ne uzas aŭtojn, estas la plej sanktaj
homoj?
Ĉar ili pie diras.*

*Kiu esperanta duopo volas reformi la akuzativon
de Esperanto?
Ĵomart kaj na Taŝa.*

*Kiu esperanta grupo agadas en la kampo de genra neŭtraleco?
La Perdita Genr-racio.*

*Ĉu vi scias pri la tempesto atendata de ĉiu esperantisto?
La fina vento.*

*Kaj pri tiu momento, kiam ĉiuj havos nur unu lokon por sidi?
La fina benko.*

*Kio okazas kiam alkoholaĵo gajnas premion?
La vina venko.*



*El la prelego "Kiel vortŝerci en Esperanto",
farita de Emerson Santos dum
la 54-a BKE/39-a BEJK en Gojanjo.*

Esperanta Kosmogonio

Izrael Lejzerowicz

1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis volapukon. 2. Kaj Volapuk estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto. 4. Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona: kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapuk. 5. Kaj la Spirito nomas Esperanton Eterna Tago, kaj Volapukon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno - unu tago.

6. Kaj la Spirito diris: Estu firmaĵo en la lingvo. 7. Kaj la Spirito kreis tiun firmaĵon. 8. Kaj Li nomis la firmaĵon regula akcento. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

9. Kaj la Spirito diris: Kolektiĝu la reguloj gramatikaj en unu lokon, kaj aperu la firma grundo; kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito nomis la firman grundon Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 10. Kaj la Spirito diris: La Fundamento kreskigu verdaĵon, kiu naskas ĝojon, vortaron, kiu donas laŭ sia speco radikojn, kies semoj estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj fariĝis tiel. 11. Kaj la Fundamento elkreskigis verdaĵon laŭ sia speco: verdan lingvon kaj verdan movadon, vortaron kaj arbon, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 12. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

13. Kaj la Spirito diris: Estu lumaĵo en la ĉiela firmaĵo, por apartigi Esperanton de mallumo. 14. Kaj ĝi estu lumaĵo por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel. 15. Kaj la Spirito faris la grandan lumaĵon por regi la mondon. 16. Kaj la Spirito starigis ĝin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ĝi lumu sur la teron. 17. Kaj la Spirito nomis la lumaĵon Verda Stelo. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 18. Kaj estis vespero, kaj estis mateno. la kvara tago.

19. Kaj la Spirito diris: la vortaro aperigu moviĝantaĵon, vivajn estaĵojn kiuj fleksebligas la Lingvon. 20. Kaj la Spirito kreis afiksojn, kiujn aperigis la Vortaro, la sufiksojn kaj prefiksojn laŭ ilia speco. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 21. Kaj la Spirito benis ilin dirante: Frukto kaj multiĝu, kaj plenigu la vortaron. (Kaj tial afiksoj tiel multiĝas ĝis nun). 22. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

23. Kaj la Spirito diris: La vortaro aperigu vivajn estaĵojn, brutojn kaj vermojn. 24. Kaj la Spirito kreis la neologismojn kaj ĉiujn malfacilajn vortojn, laŭ ilia speco, por eterna turmento de la novaj verduloj. 25. Kaj la Spirito diris: Ni kreu potencon aferon, kiu respiegulos nian internan potencon; kaj ĝi estu la akso de la lingvo kaj ĝi regu ĝian gramatikon. 26. Kaj la Spirito kreis la Akuzativon: en formo de la finaĵo N. Li kreis ĝin. 27. Kaj la Spirito diris: frukto kaj multiĝu kaj plenigu la verdan lingvon kaj regu super ĉiuj ceteraj reguloj de la Fundamento. (Kaj depost tiam ĉiuj verduloj uzas la akuzativon en troa abundo.)

28. Kaj la Spirito diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn regulojn de la Fundamento. Ĝi estu por vi sanktaĵo. Kaj fariĝis tiel. 29. Kaj la Spirito rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

30. Kaj eslis finitaj la Fundamento kaj Radikaro kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. 31. Kaj la Spirito finis en la sepa tago sian laboron. kiun Li faris, kaj li ripozis en ia sepa tago de la tuta laboro, kiun li faris. 32. Kaj la Spirito benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis, legante la originalan literaturon. kiun li faris kreante.

Ĉapitro I de *El la "Verda Biblio"* (1935)

Simpla Omaĝo al S-ro Alberto Flores

Samideanaro de Sudparaiba Valo

La multvaloraj kontribuajoj de S-ano Prof-o Alberto Flores por antaŭenigo kaj publika rekono de Esperanto kiel vera Internacia Lingvo sendube pravigas la nunan koran omaĝon de liaj gesamideanoj de Sud-Paraiba Valo.

La realigaĵoj de nia omaĝato favore al Esperanto jam estas bone konataj ene de la E-movado, tamen ŝajnas al ni plej taŭge ilin (re)memori ĉi tie, alivorte (re)memori pri la fruktodona agado de Prof-o Flores, jen pro dankemo nia jen kiel respiegulo al samideanara sinteno ĉe Esperanto.

Jen resume, tiaj kontribuajoj de Prof-o Flores, en la formo de kursoj kaj artikoloj, kiel sekve:

Kursoj:

Prof-o Alberto Flores kaj S-ano João Andrade Pioniris disvastigadon de Esperanto en Volta Redonda urbo, ekde 1950-jaroj. La unua E-kurso gvidata de flores okazis ĉe Spirita Asocio Lernantoj de la Vero (AEEV), kiu situas en la Strato K. Xagas, n-ro 704. En la kurso enskribiĝis 61 gelernantoj kaj post la kurso oni fondis lokan klubon, la t.n. VR E-Klubo, je 1955, Decembre la 15an.

Sekvis ĉiujare, eldonoj de E-kursoj en pluraj lokaj VR-intitucioj, nome:

- En Filozofia Fakultato (FERP), 1980
- En Spiritaj Societoj, kiel CE A Caminho da Luz kaj CE André Luiz
- En Inĝenieria Altlernejo (UFF), tri eldonoj en jardeko 1990
- En Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj (AAP-VR), regule, ekde 1998

Rimarketo: En la aranĝado de tiaj kursoj, Prof-o Flores estis kompreneble helpata de pluraj klubanoj, nome cititaj en detala 17-paĝa raporto de li preparita por informi al BEL pri niaj regionaj aktivecoj favore al la Zamenhofa Lingvo. La raporto titoliĝas: “Kelkaj notoj pri esperanto-movado en la urbo Volta Redonda, RJ” (VR, 2010)

S-ro Alberto Flores ricevas omaĝon dum BEL-Konferencoj 2016, Petrópolis - RJ.



Artikoloj:

- Esperanto en la Praktiko, aperinta en Almanako Lorenz, 2008, p. 71, kun priskriboj de bone sukcesintaj praktikaj aplikadoj de Esperanto, ekz-e en vojaĝoj al ekterlandoj

- *A prova e o fogo do Esperanto, Komunikoj*, Eldonejo Lorenz, Okt – Nov – Dec 2006, n-ro 124, p. 2

- Esperanto-Klubo, Gaúça Stelo, n-ro 20, Junio 2001

- *Espiritismo em Esperanto*, RIE, Okt 1987

- *Escritas & Linguas na comunicação*, Fator (AERJ), Jul-Ago 1986, p. 11

Teknika traduko al Esperanto

Cele promocii eksterlande la ĉefan ekonomian aktivecon en nia regiono de Sud-Paraíba Valo, nome ŝtalan uzinon de Brazila Siderurgia Kompanio (CDN), Prof-o Flores

esperantigis la siderurgian katalogon “Volta Redonda, la granda ŝtal-produktejo de Brazilo”, kiun li prezentis kaj disdonis dum la 66-a Universala Kongreso en Braziljo, 1981. Jen grava iniciato de S-ano Flores, per kiu eblis tio: per Esperanto transporti trans la maroj, al pluraj malproksimaj landoj, la nomojn kaj de nia urbo kaj de CSN Ŝtala Uzino

Konkludo

Pro ĉio tio farita/ata/ota de Vi, Prof-o Alberto Flores, vi estas vere gratulinda! Ricevu de ĉiuj gesamideanoj niajn plej korajn dankojn! Vivu Prof-o Alberto Flores!

VR E-klubo kaj Nia Espero E-Grupo, dum Sud-Paraíba Valo E-Renkonto, GREBAL, Barra Mansa, Brazilo, Junio 2010.

tempo-linio



1923

Naskiĝis en urbo Sankta Maria, Suda Riogrando

1946/47

Ek-kunlaboris en E-societo de Portalegro kaj redaktis la bultenon *Suda Stelo*

1949

Edziĝis al Cleicy Zamora, same esperantisto.

1951

Atestiĝis pri elementa lernado de Esperanto (BEL). Iĝis UEA-delegito en Portalegro

1955

Iĝis inĝeniero de CSN kaj translokiĝis al urbo Volta Redonda

1958/59

Loĝis en Germanio, reprezentis Brazilon en la 43-a UK en Mainz, Okcidenta Germanio, kaj en aliaj eventoj

1978

Partoprenis la 1-an Latin-Amerika Kongreso de Esperanto (Marilja, Brazilo) kaj prezentis la unuan eldonon de CSN-libreto

1981

Partoprenis la 66-an UK en Braziljo

1999

Ekinstruis Esperanton en la Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj de Volta Redonda

O Esperanto e a Sociedade Internacional dos Estudantes

Alberto Flores - P. Alegre (1º lugar no concurso de "Juventude Unida")

Tanto esperantistas como sieanos buscam concretizar o grande Ideal de Paz e Fraternidade entre os Homens.

Os esperantistas dispõem de um veículo maravilhoso para facilitar as intercomunicações, a língua artificial Esperanto, notável pela sua facilidade e compreensibilidade.

Os sieanos usam, como meio de intercomunicação, a carta, o mais simples, mais prático e ao alcance de todos.

O verdadeiro valor da correspondência cultural amigável, como fator de aproximação e entendimento entre os povos, ainda não foi bem percebido pela maioria.

O verdadeiro mérito da língua Esperanto, como linguagem ideal para o entendimento entre os povos, inexplicavelmente ainda não foi compreendido por todos os homens.

Os sieanos usam a conversação escrita, por ser um meio prático de se entenderem à distância.

Os esperantistas têm uma linguagem simples, utilizável com vantagens, tanto na conversa escrita como na falada.

Os ideais de ambos se harmonizam e se casam, perfeitamente se completando. Ideal será, pois, que ambos se unam e

trabalhem juntos em prol de sua causa comum.

O Esperanto é algo de utilidade incontestável para facilitar as relações e amizades entre os sieanos de todo mundo. É de se esperar, portanto, que os membros da S.I.E., sabendo disto, a êle se dediquem, dando mais uma mostra de sua compreensão e idealismo.

A S.I.E. é uma entidade que, associando idealistas de boa vontade, em todas as terras, pode prestar ao movimento esperantista inestimáveis serviços; não só na propaganda e divulgação do Nobre Idioma, como formando novos "samideanos", interessados e sinceros, capazes de dar um novo vigor e notável impulso ao Esperanto. É necessário, pois, que os esperantistas apoiem e venham colaborar com a S.I.E., buscando no meio estudantil os futuros continuadores de sua idealística obra.

O caráter de neutralidade dos dois movimentos irmãos permite, numa admirável confraternização, que deles participem todas as gentes. A elevação do seu ideal oferece, aos que nêle participam, oportunidade de serem realmente úteis à Pátria e à Humanidade, numa eficiente contribuição para a felicidade e bem

estar geral.

O ideal que orienta esperantistas e sianos não é particularista; não é de nenhum grupo, é de todos os que sentem ser a fraternidade melhor do que a beligerância e o egoísmo.

A intercooperação de esperantistas e sianos é, por conseguinte, possível e desejável, pois o Esperanto é útil à S.I.E. e esta não menos útil ao Esperantismo.

Ambos saberão compreender isto, ampliando, cada vez mais, a

colaboração que já se nota entre os dois grupos, numa magnífica demonstração do quanto é elevado o espírito de fraternal colaboração, amizade e cordialidade, que anima sincera e desinteressadamente os sianos e os esperantistas, no desejo de conseguir um Mundo de Fraternidade e de Paz para todos.

Teksto publikigita en
Rio Esperantista n-ro 7,
Oktobro 1947.

Pri Esperanto-Klubo kaj Ni

Alberto Flores

Kiel vi bone scias, la vivo de Esperanto-klubo ne ĉiam estas facila. Allogitaj de la beleco de la lingvo kaj de la nobla idealo esperantista, kelkaj homoj fondas Esperanto-klubon, kaj entuziasme laboras por ĝi.

Dum iom da tempo la klubo floras kaj bone funkcias; ĉiuj kunlaboras kaj estas aktivaj. La klubo prosperas, organizas kursojn, kunsidojn, festojn, kaj faras grandan bruadon. Poste, la ĉefaj gvidantoj jam ne trovas kondiĉojn por bone labori; jam ne estas plena apogo de la klubanoj. Kelkaj anoj perdas la entuziasmon, laciĝas aŭ translokiĝas; foriras kaj ne plu aperas en la klubo!

Bedaŭrinde, multaj eĉ forlasas la

movadon! Eble ili trovas la kunsidojn nekulturaj kaj neinteresaj; eble ne gajaj, ne agrablaj, eĉ tro seriozaj. Sed, ĉu ili sin proponas fari ion por igi pli interesaj la kunsidojn? Tute ne. Ili estas kiel tiuj homoj, kiuj ne volas helpi en la laboro de semado; ili nur volas profiti el la rikolto!

Mi opinias, ke ni rajtas esti gajaj, amuziĝi, sed ni ne rajtas esperi, ke Esperanto-societo estu loko por klaŭnaĵoj kaj aliaj ne-seriozaj banalaĵoj.

Feliĉe, malgraŭ la malfacilaĵoj, la veraj esperantistoj neniam ĉesas labori por Esperanto. La frata sento, kiu estas la animo de Esperanto, neniam malaperas, neniam mortas, ĝi

ĉiam renaskiĝas kaj denove brilas, kiel la suno, kie ajn estas iu esperantista koro.

Kaj per la sindonemo, altruismo, espero, fido kaj laboro de fidelaj idealistoj, la kluboj de Esperanto revigliĝas, aŭ nova grupo aperas kaj rekomencas la agadon por konstrui ponton de amikeco inter la homoj de malsamaj lingvoj kaj landoj.

Kial? Ĉar Esperanto estas admirinda kaj nobla idealo. Ĝi meritas, ke ni dediĉu al ĝi iom de nia tempo kaj laboro. Esperanto jam venkis multajn malfacilaĵojn, kaj ĝi daŭre venkos ĉiujn aliajn barojn. Malgraŭ ke kelkaj homoj ne bone komprenas ĝian utilecon kaj kontribuon por la monda paco kaj kulturo, Esperanto marŝas antaŭen kaj progresas en ĉiu parto de la Tero.

Karaj geamikoj, ni ne perdu la fidon je nia idealo. Ni ne malesperu se, kelkfoje, nia afero ne marŝas tiel

rapide kiel ni deziras. Nia laboro ne estas vana kaj ni ne estas solaj. Tute ne. En ĉiu lando de nia mondo estas aliaj sindonemaj esperantistoj, kiuj laboras konstante por Esperanto. Ni estas marŝantaj sur ĝusta vojo kaj nia sukceso jam komencas aperi, ĉar la bonaj kaj noblaj idealoj ĉiam fine venkas.

Do, karaj gesamideanoj, ni fidu kaj laboru, ĉar, certe, venos la tago kiam la inteligentaj homoj de la tuta mondo rekonos la valoron kaj utilecon de nia bela lingvo.

La progreso kaj feliĉo de la Homaro nepre bezonas nian kunlaboradon kaj agadon. Ni faru nian eblon. “Ni fosu nian sulkon”. Ni restu fidelaj kaj aktivaj.

Teksto publikigita en

Rio Esperantista, apr-jul 1998.



supre: S-ro Alberto Flores kaj gelernantoj dum Esperanto-leciono. AAP-VR, Volta Redonda - RJ, 2013.
maldekstre: S-ro Alberto Flores intervjuata de loka televid-kanalo.



Unuafoje oni fotis nigran truon

Wendel Pontes kaj Loïc Rossi

La 10-an de aprilo 2019 fariĝas nun tre grava dato. Sciencistaro anoncis, post longa kuna laboro, ke ili sukcesis foti nigran truon. Ili elmontris la rezulton de grandega klopodo kiu arigis pli ol 200 sciencistojn. Sed kion la foto reprezentas?

Unu el la notindaj aferoj estas, ke tiu foto konfirmas la ekziston de nigraj truoj. Tiuj objektoj estis prediktitaj de la teorio de relativeco, elpensita de la germana sciencisto Albert Einstein. Li proponis, ke spaco suferas ŝanĝiĝojn pro grandaj fortoj, kiel tiuj de tre densaj kosmaj objektoj. La malfacileco malkovri nigrajn truojn devenas de la fakto, ke teorie ilia denseco estas tiom forta, ke eĉ lumo ne povas eskapi el ili. Pro tio, nigraj truoj estas nevideblaj.

Sed se ne estas lumo, kiel oni povas foti? Oni fakte povas observi la spurojn de la manĝo de la nigra truon. Teamo da sciencistoj planis fari ĝuste tion. Pruvoj montris, ke estis

nigra truon en la galaksio Messier 87 (M87), kiu troviĝas 55 miljardo da lumjaroj el la Tero. Ili direktis sian atenton al la loko kie troviĝas la nigra truon, kaj provis observi la gason kiu ekzistas ĉirkaŭ la truon. La denseco kaj la gravita forto de la nigra truon altiras la ĉirkaŭantan gason kiu fluas kvazaŭ rivero. La rapideco kaj premezo altigas la temperaturon de la gaso al miljardo da celsiaj gradoj. Tio eligas radiadon. Kaj tiu radiado ja videblas en radio-ondolongoj.

La foto iom aspektas kiel savzono. Tio tute kongruas kun la antaŭkalkuloj de la teorio de Einstein: la radioj de lumo povas esti kurbigitaj per granda maso, kiel tiu de stelo, galaksio, aŭ nigra truon. Ĉi-kaze, parto de la lumo kiu venas de malantaŭ la truon estas tiom kurbigita de la gravito ke ĝi tamen alvenas al ni! La sciencistoj sukcesis foti la kurbigojn kaj tiel aperas la silueto de la nigra truon, danke al la

lumo kiu turniĝas aŭ volvas ĉirkaŭe, kvazaŭ ĝi estu akvo eniranta truon.

La kapton de la radiado faris



La juna Katie Bouman, ege surprizita pri la rezulto de siaj propraj klopodoj.

di
ve
rs

aj radioteleskopoj kiuj troviĝas en montoj en Ĉilio, Usono, Hispanio, Antarktiko kaj Meksiko. Kune, celitaj al la nigra truon, ili kaptis parton de la radiado, sendis al superkomputilon, kiu kolektis la informojn per specifa algoritmo. Tiu algoritmo kombinis la datumojn de unuopaj teleskopoj kiuj tiel funkciis kiel unu sola giganta teleskopo (fakte, de la grando de la propra Tero-planedo). La rezulto estas la nun fama foto.

Sed antaŭ tiu observo ne estis matematiko por programi komputilon por interpreti la grandan kvanton da informoj de la teleskopoj. Tiu kiu solvis tiun gravan problemon estas la nun konata sciencistino Katie Bouman, kiu fariĝis tuj fama pro la foto. Ŝi kreis la algoritmon kiu

ebligis superkomputilon kompreni la dataron senditan de la teleskopoj kaj krei la faman foton. La 30-jaraĝa Doktorino Bouman eniris la historion de scienco kiel la respondeculo pri la fama foto de nigra truon.

La originala foto (kiu ilustras tiun ĉi artikolon) montras la nigran truon interne, ĉirkaŭita de la spaca gaso kiu vorticas al ĝia interno. Sciencistoj eĉ planis kiel estus la foto, surbaze de diversaj mezuriloj, kaj akorde kun la matematikaj kalkuloj. Estas bela surprizo konstati, ke la matematikaj formuloj tre precize kreis teoriantan modelon kiu fariĝis vere proksima de la realo.



Simulaĵo de nigra truon laŭ teoria modelo

Tiaj bildoj estos tre utilaj al sciencistoj por pli bone kompreni tion kio okazas en la ĉirkaŭaĵo de nigraj truoj kaj kiel tiuj voremaj monstroj funkcias. Tiu esploro estas nur la unua paŝo por novaj demandoj kaj eventuale novaj respondoj, kiuj helpas antaŭenigi nian scion pri la origino de universo kaj aliaj misteraj kosmaj objektoj.

Fonto: Blogo de ISAE
www.scienca-asocio.com

La devo sin eduki

Anderson Delgado

Estas nediskutebla fakto ke ni vivas malagrablan periodon en edukado nialande. Pli kaj pli oni traktas ĝin malĝuste. Malgraŭ tio, edukado ankoraŭ estas konsiderata kiel la solvo de ĉiuj problemoj, la ĉefa vojo kiun la homaro devas sekvi. Efektive, ĉar per ĝi ni iĝis socio el homoj kiu serĉas pacigan manieron por kunvivi, Edukado iĝis esenca afero kaj la Ŝtato sin donis la devon liveri ĝin. Ankoraŭ por multaj personoj, la familio, tiel kiel preĝejoj kaj la propra socio estas parto de tiu procezo. Sed ni devas interkonsenti ke edukado, laŭ la plej granda parto de la homoj, estas nur rilato inter la individuo kaj iu institucio. Rilato kiu transformas la “serĉadon de la saĝo” en ŝablonajn procedojn, tra kiuj ĉiuj devas tra-pasi. Tiele, la tuta homa potenco estas reduktata.

La homaro estas nature bunta je diversaj vidpunktoj kaj trajtoj, kaj grupigi tiun diversecon en normoj nur kondukas nin al subpremoj kaj

psikologiaj tordoj. Kaj dum la Ŝtato ne rekonas tiun principon, ĝi malfaciligas la solvon de la problemo.

Herbert Read, maldekstra anarkia teoriisto, en *The Education Of Free Men* (La Edukado de Liberaj Homoj, 1944) skribis: “La tuta skrukturo de edukado, tiel kiel ni ĝin imagas, estos dispecigita, se ni provos igi tiun strukturon nenatura.” Sed limigi sin al kio estas proponata estas kiel akcepti vidi la mondon trans malgranda fenestro, dum granda kaj pli intensa pejzaĝo vin atendas ekstere.

Hodiaŭe, la rompo de tiuj ŝablonoj povas esti farata individue, malebligante ke la ideo de “subpremato” haltigu la evoluon de niaj unikaj kaj specialaj kapabloj.

Oni devas repreni la pedagogian de pri-pensado, kaj krei respondecan kutimon, redonante al edukado ĝian veran kaj senfinan valoron. Ĉar ju pli da edukado ni havas, des pli ni ĝin serĉas.



Profita evento por kursgvidantoj de Esperanto

AERĴ

Okazis la 6-an de aprilo 2019 la XXI Trejnado por kursgvidantoj de esperanto en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Malgraŭ malgranda publiko, la evento kontentige atingis sian celon.

Je la malfermo, oni laŭtlegis salutmesaĝon senditan de Mireille Grosjean, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Tuj poste, komenciĝis la prelego de Aristóphio Alves pri "Aliroj, metodoj kaj teknikoj en la instruado de Esperanto". La prelego estis registrita kaj disponeblas en jutuba kanalo. En la sekvo, Dirce Sales kaj Victor Mendes prezentis didaktikajn muzikojn en esperanto kaj partoprenigis ĉiujn ĉeestantojn per kunkantado.

Post la tagmanĝa paŭzo, okazis amuza kaj profita interaga ekspozicio de didaktikaj ludoj, sub la respondeco de Marilza Silva kaj Victor Mendes. Pro ĝia sukceso, ni jam ekplanas pli ampleksan programeron kun esperantaj ludoj por la Ŝtata Renkontiĝo, kiu okazos la 18an de majo en kvartalo Bangu. Fine, oni pridiskutis planadon de enkonduka leciono de esperanto.

Dosieroj de muzikoj kaj ludoj uzitaj dum la evento estos iom pos

iom alŝutitaj al intereto kaj estos disponeblaj en la dosierujo de AERĴ.

Dum la evento funkciis la libroservo de KKE. Ni kore dankas al KKE kaj ILEI pro la subteno al la evento.



BEL-Konferencoj 2019 okazis sukcese

Paulo Sérgio Viana

La oka eldono de la jam tradiciaj BEL-Konferencoj okazis en la 19-a kaj 20-a de aprilo 2019, en la urbo Pouso Alegre, brazila ŝtato Minas Gerais. La tuta evento, sub la aŭspicio de Brazila Esperanto-Ligo kaj Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro estis granda sukceso. Sub la mirinde detala organizo de la lokaj aktivuloj, geedzoj Fábio kaj Liene Silva, en bonegaj instalaĵoj en la Kulturcentro Cleonice Bonillo Fernandes, kvindeko da homoj el dek tri urboj ĉeestis kaj aktive pridemandis la prelegintojn pri la jenaj temoj:

- Alternativaj fontoj de energio (Saulo Wanderley)
- La homo kaj la rido (Mauro Progiante)
- Rotario Internacia (João Veiga)
- Eldonprojekto “Nia Juvelaro” (José Tenório)
- Reenkarniĝo (Joel do Ó)
- Nigraj truoj en niaj hejmoj: kio post la necesujo? (Allan Argolo)
- Dulingva edukado de infanoj (Ísis Piton)
- Kultivado de orkideoj (Francisco Wechsler)
- La magio de kinoarto (Joe Bazílio)
- Poezio surbloge loĝas (Paulo

Nascentes)

La sinsekvon de la 40-minutaj prelegoj ĉiam sekvis 20-minuta vigla diskuto kun la publiko, tiel ke foje mankis tempo por kelkaj pliaj intervenoj. La prezento de prelegantoj kaj organizado de diskutoj estis klare, sprite kaj kompetente farita de Prof-ro Paulo Nascentes.

En la vendreda vespero okazis artaj prezentoj. Loka ensemblo prezentis plurajn tradiciajn brazilajn muzikaĵojn; la veterana, populara Esperantisto Amarílio Carvalho deklamis kelkajn poemojn; kaj Ísis Piton, kune kun sia denaske Esperanto-parolanta filino Milena kantis kelkajn kanzonojn, akompane de gitaro.

Dum la tuta evento funkciis sufĉe varia libroservo, krom budoj por ĉemizoj kaj Esperantaĵoj. En paŭzoj inter prelegoj, la tuta publiko povis bonguste lunci, tute senpage.

La BEL-Konferencoj 2019 bele plenumis siajn celojn: ĝi estis kleriga, amikiga, bonetosa, kulture altnivela kaj amuza.

30a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo

AERĴ

La 18-an de majo 2019 okazis la 30-a renkontiĝo de esperanto de la ŝtato Rio-de-Janeiro. En la ĉambroj de la ŝtata lernejo Leopoldina da Silveira, lokita en kvartalo Bangu, Rio de Janeiro, kvardeko da homoj partoprenis la eventon kies ĉeftemo estis “Virinoj de Esperantujo”.

La programo malfermiĝis kun arta prezentado fare de infanoj de la projekto “Verda Koreto”. Poste, Karina Oliveira (SP) prelegis pri “Historio de la feminisma movado” kaj

Dirce Sales kaj Tânia Paixão kune prelegis pri “Gravaj virinoj dela Esperanto-movado”. Dum la mateno ankaŭ okazis enkonduka kurso de esperanto al lernejoj.

Post la tagmanĝo, Vitor Mendes respondecis pri la esperanta ludejo kaj refoje la infanoj prezentis du esperantajn kantojn. En la sekvo, Walter Fontes prelegetis pri la projekto “Amu vian flagon”, AERĴ-estraro paroletis pri venontaj paŝoj de la Asocio kaj Alcione Koritzky

prelegis pri virinaj rajtoj sub la titolo “Ne estas NE”.

Fine, okazis arta momento, kun korusa kantado kunordigita de Givanildo Costa, kun gitarludado de Vitor Mendes kaj kun prezentado de la gaj-ritma kanto “Ne”, fare de Dirce Sales kaj Tânia Paixão. Laste

sed ne balaste, ĉiuj kunkantis pro la datreveno de la junulo Leandro Silvestre.

Dum la evento okazis ankaŭ infana programo, sub respondeco de Hilda de Sousa

kaj Marilza Silva. Krome, funkciis la libroservo de AERĴ kaj lunĉo estis disponebla dum la paŭzoj.



Komuna foto de la partoprenintoj

Dirce Sales kaj Tânia Paixão dum prezentado de la kanto "Ne"



13^o

Congresso Paulista de Esperanto

São Carlos/SP: 12 - 13 outubro 2019

Local do evento:

Escola Estadual Doutor Álvaro Guião

Av. São Carlos, 2190 - Centro

<http://easp.org.br/congresso>

Realização:



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Contato com a
organização local:**

Gilberto Menegasso

(16) 3307-1132

menegasso.gilberto@gmail.com

Apoio cultural:



CEMAC
CENTRO MUNICIPAL DE ARTE E CULTURA



**Prefeitura de
SÃO CARLOS**

Realização: E-Grupo Lázaro Luiz Zamenhof

2-a JUNIA ESPERANTA FESTO

(2ª Festa Junina Esperantista)

"Arraiá Esperança"

29
JUN
2019

Local: Clube dos Trinta
Rua Sapopemba, nº 1120
Bento Ribeiro/RJ

Entrada:
1Kg de alimento
não perecível

15
Horas

Ponto de Referência:
C. E. Léon Denis (CELD)

Se caracterize e venha
se divertir conosco,
pois teremos brincadeiras,
músicas, quadrilha e
comidas típicas!

